

FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

K. V. E. V.

F. U. K. E.

REDAKCIO : C. V. HOOGSTRATEN, O. PRAEM. - ABDIJ GRIMBERGEN (B)

INTERŜANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BÖRGERHOUT

NOVA REDAKCIO

Ekde la komenco de nia unuiĝo ĝis nun nia organo estis prizorgata de nia senlaca sekretario. Sed pro la kreskanta disvastiĝo de nia movado, kiu pli kaj pli postulas liajn atenton kaj tempon, li ne plu povas plenumadi tiun funkcion, tial li petis liberiĝi de ĝi.

Volonte ni prenas sur nin tiun taskon, sed tamen ne sen timemo, ĉar ni konscias pri ĝia respondeco kaj ankaŭ scias ke ne estas facile postsekvi iun, kiu faris sian taskon emnente. Akceptante la redaktorecon de nia organo, ni alcelas fari nian F. K. grava organo, kiu informas niajn anojn pri ĉio sciinda koncerne la E.-movadon kaj precipe gvidas ilin tra la kampo de Kat. Esperantismo. Por tio ni petas la kunlaboradon de vi ĉiuj, precipe tiun kunhelpon, kiu, per varbado de novaj anoj kaj anoncoj, ebligos eldoni 12-paĝan F. K. Do en la estonto oni sendu ĉion kio rilatas al la redakcio, kiel artikolojn, kritikojn, ktp. kaj ankaŭ la demandojn por « Vr. en Ant. » senpere al ni.

C. van Hoogstraten O. Praem.

Katolika Esperantismo

PAROLADO

por la unua katolika Esperanto Diservo en
Budapest.

Wij publiceeren hier de preek van Prof.
Dr. Fr. Erdey, kamerheer van Zijne Heilig-

heid den Paus, buitengewoon professor van de universiteit van Budapest, die hij gehouden heeft in de eerste van de maandelijksche Esperanto-kerkdiensten in Budapest.

PAX VOBIS...

La paco de Kristo estu kun vi, miaj karaj gefratoj! Per tiuj ĉi salutvortoj alparolas ankaŭ mi, kiel servanto de Kristo, vin ĉiujn, kiuj kunvenis je la unuafojo ĉi tie, en la domo de Dio, por festi la veran fratan amon, la interkonsenton kaj harmonion de la animoj pure de nia kara lingvo: Esperanto, kies esenco estas kunligi la animojn kaj harmoniigi la korojn kun sento de Kristo.

Jes, amindaj gefratoj, la paco de Kristo estu kun vi! La amo de la Dia Savinto ekflamigu viajn korojn ĉiam-ĉiam, tiel en la freŝa printempo de nia vivo, kiel en la malfrua aŭtuno de l' maljuneco; tiel en la feliĉa bonŝanco, kiel en la fatala malbonŝanco: tiel en la hela, gaja ĝojo, kiel en la ombra, larmoplena malĝojo! La paco de Kristo plenigu viajn korojn per sento de vera, frata unueco kaj amo por ke alvenu al ni la promesita kaj tiom sopirege atendita: Regno de Dio!

La paco mia estu kun vi, diris Jesuo! Jen mi estas kun vi! Jes, miaj karaj gefratoj! Kristo donas al ni sian pacon, Kristo plenigas nian koron per dolĉa feliĉego, ĉar Kristo amas nin kaj volas unuigi nin ĉiujn kun sia Dia koro, kun sia Dia amo. Kristo diras ankaŭ hodiaŭ, kiam nia animo spiras la pacon, kiam nia koro arde soifas la ĉielan, veran amon: Venu al mi, jen mi estas!

Ĉu vi ne sentas, miaj plej karaj gefratoj, ke nova sento plenigas nian koron? Ĉu vi ne ekflamiĝas aŭdinte lian voĉon vin vokan-

tan? Kristo diras ankaŭ al ni, kiel li diris al siaj apostoloj kaj disĉiploj: jen mi estas!

Kie vi estas, nia Dia Savinto? Kie ni povus vin trovi, nia Dia amanto? Kie ni serĉu vin, plej kara, amegata Kristo?

Jen, mi estas ĉiam kun vi, mi volas resti ĉiam-ĉiam, ĝis la fino de l'mondo kune kun vi en la sakramento de l' amo, en la sankta Eŭkaristio de l' altaro! Jes, jes, en tiu mistera, blanka hostio enloĝas la sama Kristo, kiu diris foje: jen mi estas! Tie, en la modesta formo de la sankta Eŭkaristio li diras senĉese: venu al mi, jen mi estas! Venu, prenu kaj manĝu mian korpon, prenu kaj trinku mian sangon, mi volas doni min mem al vi!

Kristo, la dia amanto volas veni en nian koron, en formo de la eŭkaristia hostio, Kristo, la dia pacalportanto volas unuigi kun nia koro, Kristo nia dia frato volas resti seninterrompe en nia animo! Li volas nin suprenlevi el nia malsupra humileco, li volas nin purigi el nia malpura pekeco, li volas nin perfektigi el nia senpova malperfekteco.

Kristo vokas nin! Kristo atendas nin! Kristo volas, ke ni ĉiuj konsciigu pri Lia ĉeesto kaj amo, pri Lia deziro kaj atendado, pri Lia dia alvoko!

Kristo vokas ĉiujn homojn, kiuj havas ankoraŭ bonan volon, por ke la pacamantoj, la frataj animoj renkontiĝu en unu granda solena eŭkaristia kunveno, ĉi tie, sur la tero de Sankta Stefano, en nia ĉefurbo. Jam malfermiĝis la sankta jaro, jam komenciĝis la jubilea, eŭkaristia tempo, kiam nur unu voĉo aŭdiĝas laŭlonge de la terglobo: Kristo vokas vin, Kristo atendas vin, Kristo amas vin!

Jes amindaj gefratoj, ĉie sur la tero Kristo vokas nun la homojn al ni. Ĉie sur la tero Kristo altiras al nia ĉefurbo siajn fidelajn disĉiplojn, ke nia metropolo estu la kunveno de la dia paco, la sanktejo de l' frata amo kaj la ĝermo de nova epoko, kiam homo ne plu malamos siajn proksimumojn, kiam frato ne miskomprenos siajn gefratojn, kiam regnos paco kaj amo de Kristo!

La sankta jubilea jaro komenciĝis! Ek al laboro, miaj plej karaj gefratoj! La voĉo de Kristo resonadas jam de unu angulo de la terglobo ĝis la alia. Ni ne povas plu resti senmovaj! Ni devas prepari unue nian propran koron, nian propran animon, por ricevi Kriston, por ĉirkaŭpreni Lian dian koron kaj

pleniĝi per Lia spirito. Ni devas vivi sankte, pace, amante, en la ĉeesto de Kristo. Ni devas renovigi nian vivon laŭ la vivo de l' eŭkaristia Savinto!

Sed tio ne sufiĉas! Ni devas fariĝi fervoraj apostoloj de Kristo! Ni devas labori por ke tiu solena kunveno de veraj disĉiploj de la eŭkaristia Savinto estu kiel eble plej solena, plej brila, plej sukcesplena. Ni ĉiuj, la elektitoj, la gastigantoj, ni devas jam nun pleniĝi nian koron de vera sento de Kristo, de vera frata korinklino, de pura dia amo, por ke ni povu akcepti niajn fratojn en la spirito de Kristo. Ni estos vere gastigantoj de la tuta homaro, ni devas akcepti la rolojn de la evangelia Marta kaj Magdalena. Ni devas ornamo la altaron, ni devas karesi la korojn, por ke ĉiuj vere sentu la pacon kaj amon de Kristo en nia domo, en nia ĉefurbo.

Plej karaj gefratoj! Tiu sento estis ne la lasta motivo kial ni ellernis nian karan lingvon, Esperanton! Ni volas esti apostoloj, ni volas esti perantoj de la Krista paco kaj amo, ni volas gastigi la tutan homaron ĉe la eŭkaristia altaro. Ni volas kaj devas do paroli kun la tuta homaro en iu ajn lingvo, kiun ĉiuj komprenu! Sed nur unu estas inter la lingvoj, kiu estas esence la lingvo de la homaro, la lingvo de la frata kompreno, la lingvo de la internacia konsento: nia kara Esperanto!

Jen, Esperanto estu nia helplingvo, Esperanto estu nia lingvo de agapo, t.e. de la granda eŭkaristia vespermanĝo! Ĉar nur Esperanto estas la plej taŭga komprenilo kaj kunligilo, kiu efikas, ke ni ĉiuj vere kun frata sento ĉirkaŭu la eŭkaristian altaron, ke ĉiuj kun frata paco kaj ama sento festu brile, solene la Reĝon de l' paco, la Reĝon de l' amo, la Reĝon de la homaj koroj, Jesuon Kriston! Amen!

Prof. Dro Francisko Erdey.

I. K. U. E.

ONS 20-ste I.K.U.E.-KONGRES

6-11 Aug. 1938 - Ljubljana-Joego-Slavië.

We ontvingen van den ijverigen Voorzitter van onze zusterafdeeling in Nederland de volgende mededeeling over de «N.K.»-karavaan naar ons jubileumkongres in Ljubljana en nemen het aan als een sympathieke uitnodiging voor onze leden, samen de reis te ondernemen naar Laibach.

«Nederlanda Katoliko» - karavaan naar ons jubileumkongres.

Kongresinschrijving.

Iedere deelnemer aan deze «N.K.»-karavaan moet ingeschreven zijn als kongresdeelnemer. Kotizo bedraagt fl. 2.25 (37 fr.) en kan door mijn bemiddeling worden opgezonden. Ook niet-leden van «N.K.» (of F.I.K.E.) kunnen zich laten inschrijven.

Reisaanvang.

De reis vangt aan op Woensdag 3 Augustus te Arnhem, alwaar de Rheingold-Expres om 9.40 uur vertrekt. Om 20.15 uur komt deze luxe trein te München aan. Deze reis wordt gemaakt in voorbehouden 2^e Klas wagens. Verblijf te München tot Vrijdagsmorgen. In onderling overleg worden kleine excursies naar bezienswaardigheden georganiseerd.

De reis vanaf München naar Laibach en terug tot München geschiedt in D-treinen 3e klas.

Vertrek op Vrijdag 5 Augustus van München: 8.50 uur: aankomst Garmisch-Partenkirchen 10.12 uur.

Bezoek aan de beroemde Partnachklamm.

Vertrek Garmisch: 15.35 uur. Aankomst Insbrück: 17.42 uur.

Nachtverblijf te Insbrück.

Zaterdag 6 Augustus vertrek Insbrück: 9.55 uur: aankomst Laibach 19.42 uur.

Verblijf in Laibach.

Voor de regelingen gedurende het Kongres raadplege men het programma in Espero Katolika.

In de kongresweek bestaat gelegenheid om verschillende excursies te maken per autobus, met Laibach als uitgangspunt.

Terugreis.

Vertrek uit Laibach: Vrijdag 12 Augustus: 9.44 u. Aankomst te Salzburg 16.38 uur.

Verblijf te Salzburg tot Zaterdagmorgen.

Vertrek uit Salzburg: 6.30 uur. Aankomst Arnhem Zaterdag 13 Augustus: 20.24 uur.

Vanuit München wordt de reis wederom gemaakt in 2e Klas per luxe trein «Rheingold-Expres».

De reissom.

In de reissom is inbegrepen, de geheele spoorreis van Arnhem tot Laibach en terug tot Arnhem. Daarvan het traject Arnhem-München en omgekeerd in de 2e Klas; het overige traject in 3e Klas D-treinen.

Verder logies gedurende 10 nachten, benevens ontbijt.

Eveneens de volgende maaltijden:

1^o dag: Lunch en diner in den trein.

3^o dag: lunch in Garmisch, diner in Insbrück.

4^o dag: lunch in den trein.

10^o dag: lunch in den trein, diner in Salzburg.

11^o dag: lunch en diner in den trein.

De overige maaltijden behoren de deelnemers zelf te verzorgen.

De totale reissom bedraagt Fl. 115.00 (1895 fr.)

Men wordt verzocht bij aangifte, gelijktijdig een bedrag te storten van fl. 15. De rest ad. fl. 100 voor 15 Juli.

Alle opgaven aan onderstaand adres:

H. DAMEN, 10 Brugstraat 's Hertogenbosch Nederland.

N.B. — Laibach is hetzelfde als Ljubljana.

Joego-Slavië is een schoon maar te weinig gekend land. Het strekt zich uit langs de Adriatische Zee en grenst aan niet minder dan 7 landen: Italië, Oostenrijk, Hongarije, Roemenië, Bulgarije, Albanië en Griekenland. De bevolking bestaat uit Slowenen, Kroaten en Serven, waarvan 6 miljoen katholieken zijn. De algemeene taal is het Servisch. Ons jubileum kongres biedt een beste gelegenheid dat schoone berg- en boschachtig land te bezoeken en te leeren kennen. Het is bovendien een land waar men zeer goedkoop kan leven. We twifelen er dan ook niet aan of velen van onze Vlaamsche Katholieke Esperantisten zouden gaarne aan het jubileumwereldkongres van Kath. Esperantisten deelnemen.

Voor onze leden die volgens een goedkoop reisplan verlangen te reizen dan dat van de N.K.-karavaan, richten wij een

F. U. K. E. karavaan

in, waaraan ook niet-FUKE-leden kunnen deelnemen. Hierover kunnen wij voorloopig slechts mededeelen dat de reiskosten niet meer zullen bedragen dan 800 fr. indien we gaan in derde klas en 1150 fr. wanneer we in tweede klas reizen. Hierin is dan niets begrepen dan de reiskosten. Doch daar, zooals we reeds zeiden, het leven in Joego-Slavië zeer goedkoop is, zullen de gezamenlijke kosten niet veel meer beloopten dan 1000 fr. 3^o klas. De reis kan dan gebeuren over twee verschillende wegen. Men kan de heenreis doen over Namen, Luksemburg, Straatsburg, Bazel, Luzern, Milaan en Venetië en de terugreis als volgt: Laibach, München, Augsburg, Ulm, Karlsruhe, Luksemburg enz. (28 uur trein). We zullen in ons volgend nummer hierover meer bijzonderheden geven. We hopen dat onze lezers die er wenschen aan

deel te nemen, dat **spoedig** aan ons laten weten en ook meedeelen welke hun verlangens zijn omtrent de reis (b.v. 2^e of 3^e klas; bezoek aan Venetië of andere bezienswaardigheden enz.) opdat we daarmee rekening kunnen houden in ons reisplan.

Het is van groot belang spoedig op te geven of men van plan is aan het kongres deel te nemen, daar dit noodzakelijk is om de goede voorbereiding van het kongres te verzekeren, en zeker te zijn van goedkoop nachtverblijf.

De kongresbijdrage bedraagt Din. 50. Deze zende men naar de algemeene Sekretaris van IKUE: Ales Berka Nové Sady 49, Brno, Tsjecho-Slowakije, of aan K.V.E.V. Aalst. (fr. 35).

C. van Hoogstraten
Abdij Grimbergen (B.)

PROGRAMO DE LA KONGRESO

La programo de nia XXa estas tre riĉa kaj do sufiĉe granda, tiel ke ni ne povas publikigi ĝin entute. Ni resumos la plej gravan.

De la 6a-16a de Aŭg. okazos artekspozicio en paviljono de Jakopiĉ. Ĉiu enirbileto estos numerigota kaj la 16an oni ellotos unu numeron, kies posedanto ricevos artan pentraĵon de Slovena pentristo en valoro de Din. 3.000 (ĉirkaŭe 2000 fr.) Ankaŭ okazos dum la tuta kongreso PM-foiro kiun aranĝos la filatelista sekcio de S.E.A.

Sabaton 6. VIII: je 16.30 h. ĝenerala kunveno de J.K.E.L.

20 h. solena kunsido de L.K.K. kaj I.K.U.E.: ĉirkaŭ 21 h. interkonatiĝa vespero.

Dimanĉon 7. VIII:

10 h. solena malfermo de la kongreso

13 h. Komuna fotografado.

13.30 h. komuna tagmanĝo en salonego de «Metropol».

16.30 h. 1a IKUE-kunsido.

20.30 h. solena akademio.

Lundon 8. VIII:

10 h. 2a IKUE-kunsido.

13 h. (laŭdezire) komuna tagmanĝo en ĝardeno de «Metropol».

16.30 h. Daŭrigo de la 2a IKUE-kunsido.

20.30 h. amuzaranĝo en salonego de «Metropol».

Mardon 9. VIII:

10 h. 3a IKUE-kunsido, post kiu libera tem-

po por la ekskursoj.

Merkredon 10. VIII.:

10 h. 4a IKUE-kunsido.

13 h. laŭdezire komuna tagmanĝo en ĝardeno.

16.30 h. Daŭrigo de la IKUE-kunsido.

20.30 h. Aranĝo en Franciskana salono (Teatraĵo).

Ĵaŭdon 11. VIII.:

10 h. Solena fermo de la kongreso, post kiu ekskursoj, ktp.

Tre ĝojige estas ke ĉiun kongrestagon je la 8.15 h. okazos solena diservo per iu Episkopa Moŝto. La predikoj okazos tuj antaŭ la meso je la 8a. La unuan predikon faros Episkopa Moŝto.

La unua kaj lasta Diservoj okazos en la katedralo kaj estos celebrataj de Lia Episkopa Moŝto Dro Gregorij Rozman, princepiskopo de Ljubljana, protektanto de Nia XXa, protektanto de Jugoslava Kat. Esp. Ligo kaj ĝia ano-fondinto, honora kaj fondinta ano de S.E.A. (Slovena Esp. Asocio).

La ekskursoj okazos per aŭtobuso, vagonaro kaj vaporŝipo. Oni povas elekti inter dek ekskursoj, kies prezoj kaj programoj troviĝas en Espero Katolika.

Avertoj. — De tiuj kiuj aliĝos kaj pagos la aliĝkotizon antaŭ la 31a de Marto aperos la adreso en la JUBILEA KONGRESLĴIBRO. De tiu kiu alpagas Din. 45 kaj sendas al L.K.K. sekretario sian fotografajon ankaŭ la fotografajo aperos en la kongreslibro. Kiu deziras malmultekostan loĝegon, anoncu sin kiel eble plej frue kaj aliĝu.

Kiu deziras fotografadi dum la kongreso, sciigu tion, ĉar por fotografado estos eldonataj apartaj permesiloj. La adreso de la Loka Kongres-komitato estas:

Damjan Vahen, sekretario

Reslova 29 Ljubljana

Jugoslavujo.

NI IRIS AL KONGRESO

(Daŭrigo)

Pri la **kongresregularo**, nek la estraro, nek la membroj havas ŝanĝproponon.

Sro Heilker dankas Monsron Buckx pro Lia akcepto de la honorkomitata membreco kaj de la kongresprezidanteco, pro la solena Meso kiun li oferis hodiaŭ kaj pro Lia ĉeesto en niaj kunvenoj; li esperas ke ni povu sperti

Lian apogon: Monsro Buckx dankas per vortoj afablaj por Esperanto kaj la kongresanaro, kaj deklaras ke Li «venis, vidis, kaj aŭdis ke Esperanto venkis»: poste Li donas Sian apostolan Benon kaj la kunveno finiĝas per la Kristana saluto.

Je la 3a posttagmeze nin atendis en la Binnenhof kvar aŭtobusoj por nin konduki tra la nederlanda kamparo al **Rotterdam**; tie, dum atendo de boato, ni mezuris kaj kontrolis la longecon de certa kajo, sed, kiel rekompenco, ni povis viziti la diversajn baseojn kaj dokojn de la haveno. Post rapida manĝo ni reveturis tra Delft al Hago, kie ni aŭtobuse povis vidi la ĉefajn avenuojn, monumentojn kaj parkojn de la urbo, kaj de tie tra la arbaretoj al Scheveningen, kie ĉiu tuj ekserĉis plej bonan lokon por vidi la **piroteknikan fajraĵon**. Kun kelkaj amikoj mi atingis la ponton de la Kurhaus kie usona muzikistaro paciencigis nin. Sub ni kaj ĝis vidperde sur la bulvaroj kaj sur la strando estis maro da kapoj; inter la du maroj kelkaj homoj faris la lastajn preparojn. Subite je la 10,30a h. ĉio mallumiĝis kaj komenciĝis la fajraĵo per kelkaj sagoj kiujn sekvis dum duonhoron krakegado de bomboj, sagoj, desegnaĵoj kaj fajraj fantaziaĵoj; estis kvazaŭ impresega katastrofo, sed kial tiu brila stelo ne estis... verda? Sufiĉe facile la grandegan homamason reilugis al la urbo multaj tramoj, sed kelkaj gekongresanoj laŭdire reiris piede ... iom poste.

Vendrede, la 6an de aŭgusto, ni ĉeestis la **S. Meson** celebratan de P. Smeehuizen, el Rotterdam, kaj la predikon de P. Beckers pri «La Universaleco de la Eklezio.» Ni aperigis ĝian tekston en nia pasinta numero.

Je la 10,30a h., okazis la **Tria** kaj bedaŭrinde jam **Ferma Laborkunsido** de nia bela kongreso.

Sro Heilker diras bonvenigan vorton al Jhr van Nispen tot Sevenaer, membro de la honora komitato, ĉefredaktoro de Residentiebode.

La simpata Kanoniko Rotondo el Bari (Italujo), kiu partoprenos la Universalan kongreson en Varsovio, estos tie la oficiala delegito de IKUE.

I.K.U.E. ankaŭ bezonas Sacerdoton kiu anstataŭu Pastron Poell kiel juĝanto pri la Esperanto-literaturo; la estraro proponas por tiu ofico Pastron Smeehuizen: ambaŭflanke akceptite.

Poste Sro Heilker dankas Pastron Beckers pro lia bela prediko pri la universaleco de la Eklezio dum la hodiaŭa Meso.

La dua laborkunsido finpritraktis sian tagordon, pro tio ni povas tuj preparoli la duan punkton de la hodiaŭa tagordo, t. e. la **lokone de la venonta kongreso**. Ĝis nun nur estas unu propono, tiu de Budapeŝto; kvankam la estraro findecidos, Sro Heilker petas la opinion de la kongresanaro; Budapeŝto ŝajnas al li taŭga pro sia centra pozicio, ĉar en la nuna kongreso mankas precipe kvanto da nacioj. Sro Berka rimarkigas pri tio ke en 1930 okazis en Budapeŝto universala katolika kongreso; en Brno propono de Sro Golobiĉ estis akceptita, kaj Sro Golobiĉ certe akceptus se Ĉeĥoslovakujo helpus; ni aranĝu la kongreson en Jugoslavujo; cetere nia kongreso okazos je alia momento ol la Universala Eŭkariŝta Kongreso de Budapeŝto; oni elektus la urbon Ljubljana (Laibach) kie estas viglaj katolikaj Esperantistoj, kie eĉ grafepiskopo favoras Esperanton, kie nacia kongreso sukcesis kunigi 600 personojn. F-ino Penzova (Ĉeĥ.) subtenas la proponon ĉar ne jam okazis kongreso en Jugoslavujo, kiu plie estas malmultekosta lando.

Sro Heilker akcentas ke ni precipe celu havi ie grandan imponan internacian kongreson. Sro Berka kalkulas ke el 15 landoj oni facile povas alveni en Jugoslavujon. Sro Heilker respondas ke la ĉefestraro decidus poste pri Jugoslavujo (tio estas intertempe decidita, kiel vi jam legis).

Dum tiu diskuto envenis Sro Wouters, direktoro de la Haga **Postoficejo**, kiun la Prezidanto dankas pro lia interesiĝo al nia kongreso: Sro Wouters konstatas ke la kongresa postoficejo estis tre utila kaj ege uzata.

Sro Heilker prezentas Jhr van Nispen tot Sevenaer, ĉefredaktoron de **Residentiebode**, kiu deziras alparoli la gekongresanojn. Li «ne jam» povas tion fari en Esperanto, li diras, kaj tion bedaŭras; li ĉiam multe klopodis por studi lingvojn por uzi ilin dum siaj okupoj kaj vojaĝoj, kaj konfesas ke antaŭe li ne havis fidon en Esperanto; dum siaj vojaĝoj li ofte devis kunpreni tiom da lingvoj kiom da monspecoj, sed tiuj lingvoj ne jam estas balasto, ĉar Esperanto ne jam havas sufiĉan influon en la mondo. Li deziras ke Esperanto iĝu «la» kongresa lingvo, la interkomprenilo dum vojaĝoj, la portilo ankaŭ

de eĉ la plej altaj kulturaj ideinterŝanĝoj. Li dankas pro la leciono kiun li ricevis dum niaj komplikaj kaj viglaj internaciaj diskutoj kiujn li je sia miro senpreparis jam sufiĉe povis sekvi kaj admiras la tujan tradukadon esperant aŭ nacilingven de la paroladoj de diversaj aŭtoritatoj: ni ricevu pro tio lian respekton. Li esprimas la plezuron kun kiu Residentiebode servis nian kongreson kaj dankas la kongresajn Esperanto kunlaborantojn: eble ĝis la revido. Sro Heilker tradukas.

Sro Berka dankas Sron van Nispen tot Sevenaer kaj montros Residentiebode kiel ekzemplon al la Ĉeĥoslovaka gazetaro kiu ĝis nun nur toleris Esperanton, por konvinki ilin ke Esperanto estas la plej taŭga rimedo por la Katolikismo. Sro Heilker tradukas nederlandlingven.

Post tio li malfermas la diskuton de **eventualaj proponoj**.

Sro Loeckx, el Belgujo, faras demandojn pri kunlaboro de katolikaj ligoj kun neŭtralaj kaj pri la kondiĉoj en kiuj IKUE-propagandisto povas paroladi en neŭtralaj kaj aliaj medioj.

Sro Heilker respondas ke kunlaboro estas certe ebla se estas nenio kontraŭ la katolika sento kaj la kunaj kongresoj povas utili por fari pli potencajn impresojn sur la lando, sed kondiĉe ke ne estu temoj kontraŭ la katolikaj doktrino kaj moralo, ĉar estas danĝere: kongreso dirita neŭtrala povas esti fakte kontraŭkatolika per la kadro: ni vidu Parizon. Ni certe povas paroladi en ne-katolikaj medioj, li mem faras tion; ankaŭ en la vagonaro ni propagandas sen demando pri la jes - aŭ ne - katolikeco de la kunvojaĝantoj.

Daŭrigota

NOMO.

ĈU VI RIMARKIS ?

Ĉu vi rimarkis kiel internacia estas Espero Katolika? En la du lastaj numeroj aperis artikoloj kaj informoj el Ĉeĥo-Slovakujo, Nederlando, Jugoslavujo, Polujo, Italujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Flandrujo, Litovujo kaj eĉ el Borneo kaj Ĥinujo. Se vi ankoraŭ ne abonnis ĝin, faru baldaŭ.

**EEN VOLLEDIG KATHOLIEK ES-
PERANTIST LEEST REGELMATIG ES-
PERO KATOLIKA.**

La Esperanto-mondo

LA 34-a EŬKARISTIA MONDKONGRESO EN BUDAPEST.

Lastmomente ni ricevis de la Esperanto-subkomitato de la Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝt, jenajn gravajn informojn:

« Pri la uzado de nia lingvo: Estis eldonataj 10.000 broŝuroj kaj 2000 afiŝoj. Estas dum presoj 10.000 broŝuroj. (la unuaj 10.000 jam elĉerpiĝis, N.d.l.R.) Dum la kongreso ĉiu nacio diras salutvortojn okaze de la malferma kunsido. Inter ili ankaŭ Esperantistoj. Ĉiutage ni havos apartan sanktan Meson en la jezuita preĝejo. La mesoj estas akompanataj per kantoj en Esperantlingva traduko. La malferman meson celebros Kardinalo INNITZER (ĉefepiskopo de Weenen) kaj la ferman meson grafo ZICHY ĉefepiskopo el Kalocsa. Post ĉiu meso okazos Esperantlingva prediko. Ni havos du apartajn Esperanto-kunvenojn dum kiuj okazos 6 Esperantlingvaj paroladoj pri la Eŭkaristio. Ni havos apartan Esperanto-vesperon, dum kiu diletantoj prezentos teatraĵojn Esperantlingvaj pri Eŭkaristia temo. Dum la tri ĉefkunsidoj okazos nur hungarlingvaj paroladoj kaj ili estos tradukataj nur en la italan, francan kaj germanan lingvojn, sed ne en Esperanton. Estus tre dezirinde, se la ĉefestraro ricevus amason da leteroj (**nur en nacia lingvo**) petantan la tradukon ankaŭ en Esperanton. Eble sukcesos ŝanĝi la ĝisnunan decidon... »

Do, bone atentu, niaj Flandraj kaj Nordnederlandaj samkredanoj **nenion komprenos de la paroladoj en la tri ĉefkunsidoj**, se ili ne scipovas unu el la tri traduklingvoj. Tial niaj Flandraj Esperantistoj, kiuj vizitos la kongreson, tuj skribu al la Komitato, petante ke oni almenaŭ akceptu ankaŭ Esperanton kiel traduklingvon, sed oni skribu **nur en flandra lingvo**, kiel la subkomitato mem deziras. La adreso de la prepara Komitato estas: **Postafiŝo IV. 100. Budapeŝt.**

KIU VOLAS ?

Kiu eminentulo aŭ sacerdoto el niaj anoj volas fari Esperantlingvan paroladon en Esperanto-Kunveno pri la temo: « La Eŭkaristio kaj la nuntempa situacio de la Eklezio »? Tiu skribu tuj al nia sekretariejo.

VERGEET I. K. I. niet !

▲ **Ekaperis la glumarko**, de la Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno. Tiu ĉi glumarko havos iam grandan historian valoron, pro la eksterordinara graveco, kiun tiu ĉi Mondkunveno signifas por la katolika Esperanto-Movado. La arta desegnaĵo de tiu ĉi glumarko, krom sia religia efiko, havas ion impresantan laŭ speciale hungara gusto kaj arto. Ĝi estas mendebla ĉe la Esperanto Subkomitato de la XXXIV Eŭkaristia Kongreso. Dekdu pecoj kostas unu respondkupono. La glumarkon la Subkomitato pretigis nur en limigita kvanto, do bonvolu urĝe mendi. Ni petas niajn legantojn ke ili tuj mendu tiujn belajn glumarkojn, ankaŭ tial ke oni per tio povas subteni tiun grandan okazontaron, kiu estas grandvalora por nia movado katolika. K.V.E.V. Aalst (postĉekkonto 412354) volonte ricevos 3.50 fr. kaj tiam sendos al vi 12 (eble la duoblon) de tiuj historiaj glumarkoj, tuj post ricevo de la jam menditaj 200.

▲ Dum 1937 la estona Esperanta Turista Komisiono venigis al Estonio 733 eksterlandaj turistojn, kiuj restis entute 4921 tagojn. Tiuj turistoj venis el 13 diversaj landoj. (**Heroldo**).

▲ De universiteits-Esperantisten klub in Lyon geeft een eigen tijdschrift uit met meer dan 500 abonnés.

▲ De minister van onderwijs in Denemarken besloot dat voortaan ook staatssubsidie moet worden verstrekt aan het Esp.-onderwijs in de jeugd- en avondscholen. (**Heroldo**)

▲ De minister van onderwijs in Bulgarije voerde Esperanto in, als facultatief vak in de handelsscholen van dat land. (**Esperanto**)

▲ Tot hertoe werd Esperanto gebruikt op 41 poststempels in 16 landen. Waaronder de poststempel gebruikt op ons IKUE-kongres in den Haag. (**Heroldo**)

▲ De politiekclub in Praag organiseerde een Esperantokursus waaraan meer dan 80 politieagenten deelnamen. (**Heroldo**)

▲ Sinds de Conferentie « Esperanto en la Moderna Vivo », gaat de Esp.-beweging in Frankrijk flink vooruit. Vele E-kursussen werden ingericht in Lycea en Normaalscholen, zooals te Besançon, Vesoul, Lons-le-Saunier, Grenoble, Quimper, Lyon, Parijs enz. De minister van oorlog zond een circulaire aan alle generaals-kommandanten waarin hij toelating gaf om in de kazernen E-kursussen

in te richten voor officieren, onderofficieren en soldaten.

De algemeene Directie van de Fransche Douane stond toe dat de douaniers gedurende hun dienst de E-ster dragen op hun uniform en besloot de veeltalige aanplakbiljetten die verplichtend zijn in de douanestations, voortaan ook in Esperanto te laten drukken. (**Heroldo**)

▲ Het eerste officieel Esperantoprogramma op ultra-korte golflengte, wordt uitgezonden door het radiostation van Praag. Voor Amerika heeft de uitzending plaats op 19 April, op golflengte 23.34 m. van 10.30 - 10.55 P.M. - E.S.T. Voor Europa gebeurt de uitzending 20 April op golflengte 31.41 m. van 21.05 tot 21.30. Het programma bestaat uit muziek, gezangen en toespraken. De inhuldiging van deze uitzendingen geschiedt door de directeur van het « Verda Stacio » (**Brno**), Antonin Slavik. Men moet niet nalaten, terstond na de uitzending gehoord te hebben, te schrijven naar Radiojournal. « Verda Stacio » BRNO, Tsjecho-Slowakije, mededeelende of de uitzending beviel en wat men in de toekomst verlangt. Dat station dat nog nooit E. uitzond moet overtuigd worden dat Esperanto-uitzendingen gewaardeerd worden.

▲ Novaj propagandiloj! Vinkomercisto en Gemert (Ned.) eldonis tri novaj trinkajojn je la nomo Esperanto, nome: Esp. likvoro: Esp. vino kaj Esp. limonado. Tiuj trinkajoj estas verdakoloraj kaj tre bongustaj. Laŭ la etiketo, kiu estas en Nederlanda kaj Esperanta lingvoj, ili estas trinkajoj « por sinjoroj same kiel por sinjorinoj ».

Kiu deziras la monopolon de importo kaj vendo en Belgujo, skribu tuj al la fabrikisto: P.M.M. Remmen, Vinkomercisto, Heuvel, Gemert (Nb.) Nederlando.

▲ **Nieuwe Sluitzegels:** Het Intern. Eucharistisch Kongres. Budapeŝt geeft sluitzegels uit: stort 3,50 fr. op postch. 412354 van K. V.E.V., Aalst en U ontvangt een aantal dezer historische sluitzegels (12, 240 fr. X volgens prijs van Budapest).

Ook het Wereldcongres IKUE te Ljubljana zorgt voor een kunstzinnige sluitzegel, bestel bij KVEV: 25 voor 3 fr., 50 voor 5 fr., 100 voor 8 fr.

VERGEET I. K. I. niet !

Vraag en Antwoord

(De drie eerstvolgende vragen werden gesteld door leerlingen van de Nijmegen-kursus.)

No 14: Hoe komt het dat men het woord dikwijls op twee manieren kan vertalen?

Antw. Voor dikwijls gebruikt men ofte en voor meermalen plurfoje of plifoje. Multfoje komt men niet veel tegen. Er ligt misschien een nuance tusschen ofte en multfoje. Ofte is dikwijlder dan multfoje.

No 15: Wat is het verschil tusschen vi en ci?

Antw. Het verschil tusschen vi en ci is hetzelfde als in het Fransch tusschen vous en tu en in het Noordnederlandsch tusschen U en jij. Dus in gemoedelijke gesprekken, b.v. onder huisgenooten en vrienden of tegenover ondergeschikten en kinderen kan men ci gebruiken, anders vi. In Esperanto gebruikt men echter bijna uitsluitend de beleefdheidsvorm vi, zoodat het wel te betwijfelen is of het woordje ci ooit zijn rol zal vervullen waar het voor is uitgekozen.

No 16: Waarom geen n aan enloĝanto in: Tie naskiĝis la 500a enloĝanto?

Er werd geboren, wie? dus n.

Antw. La 500a enloĝanto is hier het onderwerp van de zin, dus zonder n. Uw moeilijkheid komt misschien voort doordat hier het onderwerp achter het werkwoord staat. In dit geval ontmoet men meermaals een n achter het onderwerp, zoo b.v. in «tie okazis kongreson» en dergelijke. In deze gevallen maakt het onderwerp bij personen die aan geen 4^e naamvalsvorm gewoon zijn, den indruk lijdend voorwerp te zijn.

Meer waarschijnlijk ontstaat uw moeilijkheid hieruit dat U geen onderscheid maakt of het werkwoord in de bedrijvende of in de lijdende vorm staat. Laten we om het duidelijk te maken een werkwoord nemen dat een bedrijvende en een lijdende vorm heeft, daar geboren worden geen bedrijvende vorm bezit. B.v. la knabo estas trompita de li; de jongen is natuurlijk wel lijdend voorwerp (de dupe) van het bedriegen maar hij is geen lijdend voorwerp van het bedrogen worden. Wat in de bedrijvende vorm lijdend voorwerp is, wordt onderwerp in de lijdende vorm. Dus: li trompas la knabon, maar: la

knabo estas trompata de li. Dat het werkwoord onpersoonlijk gebruikt is, doet niets ter zake. B.v. als men zegt «er wordt een jongen bedrogen» dan blijft de jongen van het bedrogen worden toch onderwerp.

No 17: LC. en A: Kalocsay diras: Mi opinias ebla ke li ne venos. Ĉu ni ne diru: mi opinias eble, ke li ne venos?

Antw. De reden die Kalocsay voor het gebruik van ebla aangeeft (die U aanhaalde) is zeker niet juist. We leggen het gebruik van ebla liever anders uit. Het is zeker niet heel logisch dat men zeggen moet: eble estas ke li venos, maar: mi opinias ebla ke ktp. Het zou in beide gevallen ofwel ebla of eble moeten zijn volgens de logika, maar in Esperanto is de logika niet heelemaal meester zooals men wel eens beweert, maar speelt ook de klaarheid een groote rol. En om wille van de klaarheid moet het hier zijn: opinias ebla en estas eble. Zamenhof heeft zelf over die regel getwijfeld want in Hamleto schrijft hij: ĉu ne estas ebla ke ni komprenigadu per ia alia lingvo? En op een andere plaats. Plej bona estas, se vi ĝin forĝos. Ebla en bona zijn hier geen adjectief en ook geen bijwoord, daarom koos men de bijwoordelijke vorm te nemen die men neutraal noemt. Maar als men nu ook zou zeggen: mi opinias eble ke ktp; dan zou het niet zoo klaar zijn daar dan eble ook bij opinias kan hooren in plaats van bij de bijzin die volgt. In dit geval vervult het ook meer de rol van bijvoegelijk naamwoord dan van bijwoord en daarom neemt men ebla. Men kan het zoo uitleggen: mi opinias (la fakton - ĝin - tion) ebla, ke li ne venos. En men schrijft ook onbewust eerder ebla dan eble in dit geval.

Recenzoj

La Verda Koro, de Julio Baghy.

Estas alloga romano, kies teksto povas servi por kurso, kvankam la gramatiko ne estas klarigata en ĝi, nur je la fino ni trovas sintakson de K. Kalocsay sub sufiĉe tipa formo.

Kiel leĝolibro en kursoj ĝi certe havos utilon, kaj Baghy travivis en Siberio la historion, kiun li sentite rakontas.

Ekzemple la episodio pri Iĉio Pang kaj lia fratino estas tre simpatia. Paĝoj: 100. Alloga litertipo, bona papero, broŝurite.

Ellernu, progressa kurso de Esperanto de D-ro Fr. Szilagyi.

Sub la temo: La Esperantistoj devas lerni Esperanton, la konata verkisto prezentas al ni taŭgan libron por ĝisfunde kaj racie lernian lingvon, li faras tion kiel en la Adamson lernolibro, per allogaj ĉapitroj, bildoj, ludoj, kaj multaj klarigoj pri similaj aŭ parencaj esprimoj kaj vortoj.

Verko de lerta Esperantisto, kiun ni povas rekomendi.

Paĝoj: 112. Bela papero, zorgita eldono.

Koro, de Edmondo de Amicis. Prezo: 24 fr. 316 paĝoj.

Broŝurite, bela kovrilo, dika papero.

Se mankis en nia literaturo, bela libro por junuloj, kiu ankaŭ vekas intereson plenan ĉe plenkreskuloj, kiu parolas pri idealoj, bonaj sentoj kaj kortuŝaj okazintaĵoj, jen ĝi estas. Dum la legado mi pensas pri Jane Eyre, pri David Copperfield, kaj ĉiuvespere mi ŝatas legi kelkajn paĝojn el tiu ripoziga rakonto, kiu estas la ĉefverko de la aŭtoro, verkita en la antaŭmilita kvietita tempo, riĉa je vivantaj bildoj de subtilaj vivobservoj kaj kortuŝa simpleco.

La traduko, kiun faris la tradukinto de Historio de Kristo, estas lerta kaj impresiva kiel originala esperanto-teksto. La legadon faciligas la divido en apartaj ĉapitroj. Neniu mendonto bedaŭros la akiron de tiu libro, jam tradukita en pli ol 100 diversaj lingvoj.

Hebt U reeds een nieuwe abonné of een aankondiging voor ons aangeworven ??? Zoo niet, doe het dan spoedig.

Nia movado

EDZIGO. — La 17-an de Februaro 1938. edziĝis en Roeselare nia ano kaj presisto Sinjoro Henri Braekevelt kun Fraŭlino Elisabeth Callewaert. Laŭ nia scio Fraŭlino Callewaert ankaŭ estis membrino de la ruselara E. grupo kaj anino de F.U.K.E. Estas do vera Esperanta geedziĝo.

Al la novaj geedzoj F.U.K.E. deziras tutvivan feliĉon, ĝojon kaj ĉiaman sunbrilon. Nia presisto nun havante Esperanto-helpon certe duobligos siajn zorgojn por nia Flandra Katoliko kaj ni ne dubas ke Sinjorino Braekevelt volonte kaj plezure donos helpan manon en lia Esperanto-laboro.

GRATULOJ. — Ni gratulas Sinjoron Joseph Lernout, membro de la Katolika Rondo Esperantista, Mortsel, pro lia sukceso en la konkurso por la en Mortsel starigota Lieven Gevaert-Monumento. Nia samideano troviĝis ja inter la tri premiitoj, inter kies nova(j) projekto(j) la komitato faros definitivan elekton. Ni jam deziras al li bonan ŝancon.

AUXILIA. — Por kiuj ne scias kio estas Auxilia, ni ĉi tie sciigas ke ĝi estas katolika organizaĵo kiu sin okupas pri diversspecaj kursoj por malsanuloj. Nia Unuiĝo jam akceptis tri lernantojn por la Esperanto-kurso el la malsanulejo de Mont-sur-Meuse, sed estas ankoraŭ multe pli da tiaj malfeliĉuloj kiuj emas lerni nian lingvon. Plue, laŭ la lasta letero kiun ni ricevis estas ankaŭ ĉirkaŭ 200 kiuj ŝatus lerni Esperanton kaj la Nederlandan lingvon - por tiu lasta estas precipe valonoj.

Por multaj el niaj anoj tiuj skribaj kursoj estus bona ekzercilo kaj samtempe granda bonfaro. La donota kurso estas senpaga, sed la lernantoj pagos la librojn kaj la poŝtelspezojn por la resendo de la korektitaj lecionoj.

Ni ne dubas ke en nia Unuiĝo sin trovos noblanimaj Esperantistoj kiuj volas sin dediĉi al tiu vera kristana helpo de niaj kompatindaj fratoj. Konatigu vin al la sekretario kiu interrilatos kun Auxilia, kiu sendos al la interesuloj ĉiajn sciigojn kaj adresojn de la kursanoj.

KATOLIKA RONDO ESPERANTISTA MORTSEL. — En Decembro pasinta, niaj membroj, ĝuis sur filmo, farita de S-ro Lernout la rigardon de siaj propraj movoj kaj vizaĝoj. Estis kompreneble ege agrabla, amuzaj kaj interesa vespero.

Kvin membroj partoprenis dum Februaro en la tiel bone sukcesinta regiona renkontiĝo de Esperantistoj en Turnhout. Kaj... ni daŭrigas la tagordon.

ESPERANTO ĈE LA BLINDULOJ. — Ni ricevis jenan komunikon el Brugge: «Misschien kan het Ued. interesseren dat wij in onze moderne Braille-drukkerij voor blinden het «Leerboek voor Esperanto» van G. H. Benink gedrukt hebben in Braille. Het geheele werk beslaat in blindendruk 2 dikke banden van 250 bladzijden dik papier. Meer dan 100 Vlaamsche en Nederlandsche

blinden hebben er op ingeschreven en leeren druk Esperanto.

In het Blindeninstituut te Brugge, wordt momenteel ook een cursus gegeven van Esperanto, in de hoogste blindenklas, door Uw dienaar.

Ter inlichting! Met hartelijke groeten, **Arnold Ghesquiere**, Secretaris van het werk: « Licht en Liefde voor onze Blinden, Jeruzalemstraat, 11 - Brugge.

Ni kore gratulas nian anon, Lia Moŝto Sacerdoto A. Ghesquiere, pro Liaj noblaj klopodoj alporti « Novan Lumon » al niaj blinduloj. F.U.K.E. esperas ke la estontaj Esperantistoj, lernantoj de la kurso de nia ano, spertos grandan ĝojon en la lernado de nia lingvo internacia.

SUBTENO F.U.K.E. — Kion pensas niaj anoj pri la lasta « Flandra Katoliko » kiu aperis sur 12 paĝoj? El diversaj flankoj ni ricevis gratulojn kaj promesojn. Tiu pligrandigo kompreneble signifas pli grandajn elspezojn. Tion oni ne forgesu kaj de tempo al tempo faru subtenan donacon por ke ni povu daŭrigi tiamaniere. Vi povas elekti inter du poŝtĉekoj: Tiu de K. V. E. V., Aalst No 412.354 kaj tiu de la sekretario J. V. Deun, No 137.438.

Omdat A. M. mij klopte en mat zette in drie zetten (ne lomperik) fr. 5.—
Hierbij ingesloten vindt U 20 frs om een deel der kosten te dekken (J. V.S., W.) 20.—
Wie cacaobonen beloofd, moet ze geven. J.V.D. 5.—
Por la kursgvidanto kiu ĉiam forgesas la horon, kaj poste devas kuri por kapti la vagonaron (kunkuranto) 5.—
Ĉar li volis simii min kaj ne sukcesis (alia simio) 1,05

MALNOVAJ FLANDRA - KATOLIKO J. — Ni estus tre dankaj al tiuj anoj kiuj havigus al ni malnovajn Flandra-Katoliko-jn. Ĉiujn ni akceptas. Bonvolu ilin sendi sekretariejen. Dankon.

PROPAGANDA BROŝURETO. — Baldaŭ ni eldonos propagandan broŝureton en nederlanda lingvo enhavantan ĉiajn sciindaĵojn pri nia Unuiĝo. Mendebila ĉe Sinjoro Douwen, nia Propagandestro, A. Van Daelstraat, 2, Wilrijk.

POR NIA PESILO. — Kiom vi ankoraŭ bezonas? frs. 5.—

ESPERANTO EKZAMENO. — Post la antverpena Esperanto-kurso, okazos ekzameno al kiu ne nur la lernantoj de la kurso en ejo Charlottelei sed ankaŭ ĉiuj niaj anoj kiuj ŝatas akiri diplomon pri simpla kapableco, povas partopreni. La ekzameno estas buŝa kaj skriba. La dato ankoraŭ ne estas fiksita sed ek de nun oni povas sin anonci ĉe nia sekretario, kiu taŭgatempe avertos ilin pri la dato, ejo kaj kondiĉoj. La ekzameno okazos en Antverpeno, verŝajne iun dimanĉon post Pasko.

INTERNACIA REVUO PRI POŝT-MARKINTERSANĜO KAJ TURISMO — Ni rekomendas al niaj filatelistoj tiun revuon kiu uzas Esperanton. Petu specimenon ĉe Jos. Philippen, Botermarkt, 10, Diest. En la No 1 aperis interesa artikolo pri « La Signifo de Vondel » de nia ano Lode Cnops.

BERICHTEN VERKOOPINSTITUUT.

1. **Zwagers' Esperanto zakwoordenboek**, door A. Blok. Prijs: fr. 18. Met veel genoeg hebben wij dit boekje doorbladerd. Het is voor beginners een uitstekend werkje en ten eerste aan te bevelen. Mooi ingebonden met gouddruk, is het een pareltje, dat ieder beginnende-esperantist moet bezitten. De prijs is zeer laag, en we verwachten dan ook menigvuldige bestellingen.

2. **Zakwoordenboek Esperanto - Nederlandsch**, door A. Blok. — Dit boekje is één deel van voornoemd werkje, en het loont wel de moeite, voor degenen die Esperanto machtig zijn, dit te bezitten. Prijs: 7 fr.

3. **Handelsbrievenboek**, Esperanto-Nederlandsch, samengesteld door de esperantisten-vereeniging «Mercurio» uit Rotterdam. Voor handelaars-esperantisten is dit boek ten eerste aan te bevelen. Ook voor steno-dactylo's is het volstrekt noodig dit te bestellen. Zij vinden er al de noodige Esperanto-handels termen in. Mooie druk en goede verdeeling. De prijs van dit werk is zeer laag gesteld: Frs. 18.

4. **Verda Koro**, door Julio Baghy. — Mooi en interessant werk. Recencie hierover vindt U elders in dit nummer.

5. **Ellernu**, daŭriga kurso, door Ferencz Szilagyi. — Dit werk is het vervolg op het

« Leerboek voor Esperanto » door denzelfden schrijver. Het is onontbeerlijk voor degenen die het eerste boek bestelden, daar het hiermede een geheel uitmaakt. Prijs: frs. 18.

La mendoj por la Kristnaska Triptiko, de Felix Timmermans, envenas regule, kaj baldaŭ la tuta stoko elĉerpiĝos, tiel ke nova eldono estos necesa.

BIJ ELKE SAMENKOMST VAN KATH. ESPERANTISTEN HOORT EEN OMHALING VOOR I.K.I.

Tra la Gazetaro

NIA STELO. — La Jugoslavaj kat. E-toj ekzemple batalas por nia katolika Esp. idealo. Ili estas radikalaj kaj kuraĝas vidi kaj diri la veron. La jan. numero enhavas kelkajn interesajn art., nome « Kiel forigi la mandan krizon? » Oni en tiu art. tre ĝuste asertas ke ni por eviti la mizeron devas sekvi la leĝon de Kristo pri la amo al nia proksimulo, kaj pli zorgi por la animo kaj do pli alte taksi la valoron de la homo ol de la materio. « Eĉ tiuj kiuj sin nomas kristanoj malproksimiĝas de la Dia leĝo, ili estas nur baptestkristanoj, la sekaj branĉoj kiujn oni devas detranĉi kaj meti en la fajron ». Jes, de la nomkatolikoj, liberigu nin, Sinjoro! Poste en tiu art. oni proponas en 5 punktoj tion kio estas necesa por mildigi la krizon el ŝtatvidpunkto. Punkto 4a temas pri la altegaj salajroj: « Unu direktoro en iu lando ricevadas tian salajron ke pere de tiu ĉi sumo vivus bone 1000 laboristoj, kion vi diras pri tiu ĉielkrianta veraĵo? » Vi pravas, Jugoslavo, estas ĉielkrianta veraĵo ke multaj ricevas salajron nejustan.

Ankaŭ interesa estas la artikolo: « Pro kio katolika organizo? »

KATOLIKUSOK CSILLAGA. — (Kat. Stelo, organo de Hung. Kat. Esp. Asocio). Ankaŭ tio estas interesa revuo. Domaĝe estas ke ni ne povas legi ĝin entute, ĉar granda parto estas en hung. lingvo. El ĝiaj Esperantlingvaj informoj oni povas konkludi ke niaj hungaraj samkredanoj fervore laboras. Ili sin organizas aparte sed tamen, se estas utile, kunlaboras kun la neŭtralaj. Tio estas la idealo. Aparta kat. organizo sed kunlaboro kun la aliaj kiam ĝi estas utila por la ĝenerala intereso.

VOJO, VERO, VIVO. — Tiu kat. revuo por nekatolikoj ankaŭ tre taŭgas por la katolikoj kiuj deziras koni sian religion kaj povi defendi ĝin. Kaj tion ĉiuj devas deziri. Tial tiu gazeto estas inter la kat.

E-toj tro malmulte konata. Ĝi estas sendata al nekatolikoj senpage, tial la eldonisto, I.K.I., devas ricevi subtenon monan, kaj tion oni povas doni per abono kiu nur kostas 13 fr. Ni citu la artikolojn. Katolikismo kaj Kulturo; Religia Demandaro; La Reformacio; Objektiveco; Religia Indiferentismo; Se vi nur havas monon (en Romo oni ĉion faras por vi). Benoj de la Kristana Kredo laŭ liberpensulo. De kie devenas la nomo « Protestantoj »; Ĉu la herezoj utilis al la mondo?; Radioprogramo de la religiaj prelegoj. Do tre valora revuo, kaj bele presita.

LA JUNA IDEO. — (Kat. Revuo por la junularo). Vere subteninda revuo. La juna Kristana fervoro kiun ni en nia tempo tiom bezonas, parolas tra ĝiaj artikoloj. Sed, ĉu la unua artikolo en la Feb. numero: « Kial ni agu? » estas taŭga por la junularo? Ni tre pridubas ĝin. La nestudinta junulo aŭ junulino ne komprenas ĝian enhavon kaj eĉ povas miskompreni kelkajn eldiraĵojn, ekzemple: « Newman tion priparolis, notante ke la libereco pensi, esprimi kaj eĉ ankaŭ trompi, estas necesa por bona farto de la katolika vivo ». Ĉu niaj karaj junuloj komprenos ĝuste kion intencis Newman, se li diras ke necesa estas trompi? Kaj kion ili konkludus el: « Do estas klare ke ni rajtas pensadi pri ĉio, kaj eldiri kion ni pensas, ankaŭ se ĝi estas eble malgusta? » La verkinto parolas grandan veron sed li devus ekspliki tion kiel la junularo bezonas.

ESPERANTO (organo de U. E. A.) — En artikolo kritikanta art. el Heroldo, ni legas kelkajn interesajn liniojn. Jen: « Tie (en Nederl.) ekzistas du landaj asocioj neŭtralaj, unu laborista, unu katolika kaj unu protestanta, ĉiuj havas la karakterizajn trajtojn de « ~~naci~~ » societo ». Ni forlasas la epiteton « neŭtrala » fariĝinta senseca en multaj rilatoj. Ĉiuj 5 kune kalkulas preskaŭ 10.000 anojn. La laborista sola atingas la duonon plej proksimume. Kaj el la 5000 neklasbatalantaj E-toj eĉ ne 500 partoprenas la internacian movadon kiel *aktivaj* anoj. Ankaŭ ni opinias ke ne sufiĉas pagi al internacia organizo etan sumeton sen pli sed ke ĉiu vera Esperantisto devas esti aktiva, minimume per abono al bona gazeto kaj se li povas al internacia gazeto. Sed ni ne interkonsentas en tio ke oni diras: unu laborista, unu katolika... Kial oni ne diras: unu socialista? Oni distingas inter laboristoj kaj katolikoj, kvazaŭ ĉiuj laboristoj estus socialistoj kaj ĉiuj socialistoj laboristoj. Tio estas stultajo senfina. Oni preferu nomi la socialistan asocion: « blindula asocio »; ĉar blindaj ili estas, almenaŭ la subuloj de la partio kiuj ne vidas ke siaj gvidantoj estas kapitalistoj kaj ne vidas ke la centmiloj katolikaj laboristoj estas multe pli feliĉaj ol ili. Ke oni nomu ĉiun aferon per ĝia vera nomo!

USE-EŬO (organo de la Eŭropanismo). — Ĝi publikigas fragmentojn el artikolo ridinda de la iama prezidanto de la germana literatura ĉambro, kiu aperis en la Stutgarter Neues Tagblatt kaj temas pri « La leĝoj de la lingva uzado en la mondo ». USE-EŬO aldonas sian kritikon. En nia sekvanta numero ni represas tiun artikolon tute aŭ parte kaj ankaŭ aldonos nian opinion. USE-EŬO estas interesa politika gazeto. Pri la Eŭropanismo-movado ni publikigos artikolon kiam ne mankos loko.

Se vi volas perfektigi vin en via religia kono kaj samtempe fari apostolan faron, tiam abonu kaj ellegu la bele presitan apoloĝian revuon « Vojo, Vero, Vivo » de I.K.I. Abonprezo nur 13 frankojn. Poŝtĉekkonto 615.97 de A. Van der Pluym, onderpastoor Wandre.

La humoraĵo de la monato

DUSENCE KAJ TAMEN EVIDENTE.

Knabeto iris tra la strato, kantante « La bela Muelilo ». Subite prenis granda manĉlin ĉe la ŝultroj, estis lia instruisto, kiu diris al sia lernanto : « Peĉjo, vi ne plu kantu tiun arion ». Mirigite demandis la knabo : « Kial ne, majstro ?, tio ja ne estas malbona kantaĵo ; ĉiuj kantas ĝin ». « Nu, diris la instruisto serioze admonante, la ario ne plu havas signifon, la muelilo forbrulis kaj la fraŭlino transloĝiĝis. »

LA SPRITULO.

« Ĉiu katoliko estas stulta, se li subtenas gazetojn kaj organizojn kiuj lin primokas »
(el Nia Stelo, Jugosl.)

Parolas la leganto

EEN GELIJKMATIGE ESPERANTO-STER.

Een van onze ijverige afgevaardigden schrijft ons : « Zou in ons revue geen plaatsje zijn om de methode te beschrijven tot het maken van een goede gelijkmatige ster ? Misschien is deze meetkundige methode wel gekend, maar ik twijfel er niet aan, weet zelfs zeker dat niet iedereen deze kent. »

Gaarne voldoen we aan dit verzoek, want zeker zijn er velen die nu en dan eens een

ster willen teekenen, maar niet de juiste methode kennen, en dan ontmoet men van die sterren die wel wat weg hebben van een kreeft.

De vijf punten van de ster zijn vijf punten op de omtrek van een cirkel, die allen evenver van elkander liggen. Om een ster te teekenen moet men dus eerst een cirkel trekken en de omtrek ervan in 5 gelijke deelen verdeelen. Daarna verbindt men die punten met twee andere punten die er het verst vanaf liggen. En de ster is gereed.

De voornaamste kwestie is dus die vijf punten op de cirkelomtrek te vinden. Men kan dat wel op goed geluk zoolang probeeren tot men er is, maar om het gemakkelijk te doen moet men meetkundig te werk gaan. Aldus :

Men trekt de middellijn A.B. (zie teekening), en daar loodrecht doorheen C.D. Om C.D. er onfeilbaar juist loodrecht door te trekken gaat men als volgt te werk : men plaatst de punt van de passer in A en beschrijft een boogje boven de cirkel en een er onder, daarna zet men de passerpunt in B en doet hetzelfde. Waar nu die boogjes boven en onder de cirkel elkander snijden liggen de punten, waardoor men de lijn C.D. moet trekken. Hierna deelt men de lijn E.B. middendoor, en plaatst dan de punt van de passer in dat midden en trekt een boogje vanuit C naar de lijn AB. Dit boogje snijdt AB in F. De afstand CF is dan juist het vijfde deel van de cirkelomtrek. Nu kan men dus de cirkelomtrek in vijf gelijke deelen verdeelen.

Men kan deze omslachtige wijze vermijden door een gradenboog te gebruiken. Met behulp hiervan kan men onmiddellijk de vijf punten op de cirkelomtrek vinden, n.l. bij graad O, graad 72, graad 144 enz.

We raden dus onze lezers aan liever een gradenboog aan te schaffen dan een passer. Gradenbogen zijn bovendien goedkooper. (7 fr. het dozijn).

N. B. — E. = middelpunt van cirkel.

Ĉu vi volas fari bonfaron pere de Esperanto ? Tiam faru donacon al I.K.I. Por Flandrujo : poŝtĉekkonto 615.97 de A. Van der Pluym, onderpastoor Wandre.